7-a Azia Kongreso de Esperanto
(= 14-a Israela Kongreso de Esperanto)
Dua bulteno

2013-04-18 - 2013-04-22
Jerusalemo, Israelo

Kongresejo: Gastejo Jicĥak Rabin

- Retejo: http://www.iyha.org.il/eng/Index.asp?CategoryID=73&ArticleID=57 (angle)
- En ĉiuj ĉambroj estas littukoj, tukoj, fridujo, televido, teo/kafo. La gastejo troviĝas apud la Muzeo de Israelo, 5 min. taksie de la busa ĉefstacidomo de Jerusalemo.

Temo: Ekologio de paco - paca kunvivado de homo, medio kaj naturo

Aliĝo

- Reta aliĝo: http://www.esperanto.org.il/ak2013.html
- Retpoŝta aliĝo: ak2013@esperanto.org.il
- Antaŭpago: 20 eŭroj al UEA-konto *elia-q*. Eblas ankaŭ per banko-transpago. Israelaj aliĝantoj povas pagi per sikloj, poŝte aŭ dum kunveno.
- La cetera kotizo estos pagota surloke.
- Ne pagipovaj aliĝantoj indiku tion en la aliĝilo.

Kotizo

Kategorio	A-landoj			B-landoj		
Periodo	ĝis 2013-01-01	ĝis 2013-03-15	poste	ĝis 2013-01-01	ĝis 2013-03-15	poste
1-lita			700			600
2-lita	280	322	364	240	276	312
3-lita	250	288	325	220	253	286
4-lita	240	276	312	210	242	273
5-lita	230	265	300	200	230	260

- A-landoj: Japanio kaj Sud-Koreio; Okcidenta Eŭropo, Nordameriko, Aŭstralio
- B-landoj: ĉiuj aziaj landoj krom Japanio kaj Sud-Koreio; Orienta Eŭropo, Sudameriko, Afriko

Rimarkoj

- La prezoj estas po persono en eŭroj (1 eŭro = ĉ. 5 NIS); la kotizoj indikitaj inkluzivas 4 tranoktojn, maten- kaj vespermanĝojn, programon kaj ekskursojn.
- Pro la limigita nombro de ĉambroj en la gastejo, 1-lita ĉambro estas rezervebla nur ekde 2013-03-15, depende de haveblo. Kiu volas pli frue certiĝi pri 1-lita ĉambro, povos mendi en unu de la apudaj hoteloj, mem aŭ pere de la organizantoj.
- Partoprenantoj, kiuj ne loĝos en la gastejo, devos pagi 50 eŭrojn (250 NIS) anstataŭ la tabelan kotizon por la programo kaj ekskursoj, kaj aldone por la vespermanĝoj: 13 eŭroj ĵaŭde kaj dimanĉe, 15 eŭroj vendrede kaj sabate.
- Partatempaj partoprenantoj ricevas rabaton de 50 eŭroj por ĉiu nokto (ekzemple, parta partoprenanto de 2013-04-18 - 2013-04-20 ricevas rabaton de 100 eŭroj).
- Ĉiu repondecas pri propra asekuro.

Programo

Ĵaŭde 2013-04-18
- 12:30: komuna busvojaĝo de Tel-Avivo al Jerusalemo (de trajna stacidomo *Merkaz*)
- 14:00-15:00: enĉambriĝo
- 15:00-17:00: vizito en la apuda Muzeo de Israelo
- 17:30-19:00: inaŭguro, prelegoj
- 19:00-20:00: vespermanĝo
- 20:00-22:00: koncerto de Jomo

Vendrede 2013-04-19
- 09:00-15:00: ekskurso al la malnova Jerusalemo (juda kaj kristana kvartaloj, *Via Dolorosa*, la Muraj Tuneloj)
- 17:00-19:00: prelegoj
- 19:00-20:00: sabata vespermanĝo
- 20:00-22:00: koncerto de Kajto

Sabate 2013-04-20
- 09:00-14:00: ekskurso al Ein Kerem kaj Abu Goŝ
- 16:00-19:00: prelegoj
- 20:00-22:00: komuna koncerto de Kajto kaj Jomo

Dimanĉe 2013-04-21
- 09:00-14:00: ekskurso ĉirkaŭ la malnova urbo de Jerusalemo (moskeoj en Templa Monto, preĝejoj en Oliva Monto, arkeologiaj fosaĵoj de David-Urbo)
- 16:00-19:00: prelegoj
- 20:00-22:00: koncerto de Jomo

Lunde 2013-04-22
- 09:00-12:00: ekskurso al Kneset, supera kortumo, la Rozĝardeno
- 13:00-16:00: prelegoj, resumo, fermo

Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Antaŭkongresa ekskurso (La Nordo): 2013-04-14 ~ 2013-04-17
- Tel-Avivo, Haifo, Akko, markavernoj, Nazareto, Tiberiado kaj Lago de Galileo, Tel-Avivo. Akompano: Jehoŝua Tilleman. Kosto: 250 eŭroj.

Postkongresa ekskurso (La Sudo): 2013-04-23 ~ 2013-04-27
- Jerusalemo, Kumran, Ein Gedi, la Morta Maro, Masado, aventura dezerta kanjono, Eilat; 2013-04-25 - du eblecoj: aŭ 1-2 taga ekskurso al Petra (kromkoste) aŭ Eilat kaj ĉirkaŭaĵo: la Ruĝa Maro, subakva rifo-spektado, Wadi Salomono kaj Monto Cefaĥot (kvar-ŝatata observejo), dezerta besta safario Ĥajbar kaj natura/arkeologia klif-parko Timna; 2013-04-27 - reveno tra la Ruĝa kanjono, la egipta landlimo, Micpe Ramon - Tel-Avivo. Akompano: Amri Wandel. Kosto: 400 eŭroj.

Detala programo: http://www.esperanto.org.il/dosieroj/ak2013turisma-itinero.pdf

Aliĝo
- Reta aliĝo: http://www.esperanto.org.il/ak2013.html
- Retpoŝta aliĝo: ak2013@esperanto.org.il
- Aliĝantoj al la postkongreso bonvolu indiki la deziratan alternativon por 2013-04-25: Eilat aŭ Petra (1- aŭ 2-taga, kromkosto de ĉ. 100-200 eŭroj).
- Antaŭpago: 50 eŭroj al UEA-konto *elia-q*
- La cetera sumo estos pagota surloke.
- Aliĝo post 2013-03-15 dependos de haveblo de lokoj kaj kostos 10% pli.